FN PER ANC 47

N° 231 JULIO 2007

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

## ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas :Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

esperanto Normandie

## Dum 2008 ni kunvenos ...

Veuillez noter et réserver dès à présent ces dates pour l'année prochaine :

- *Samedi 24 mai et Dimanche 25 mai 2008* : Assemblée Générale de notre association Esperanto Normandie + réunion de bureau du Conseil d'Administration (Le dimanche). Excursions (Caudebec en Caux et la Seine, abbaye de Saint Wandrille...le samedi) jeux, chants, cours de conversation et de perfectionnement, soirée récréative et d'échanges....
- *Samedi 27 septembre et Dimanche 28 septembre 2008 :* Excursions (dans la région de Caudebec en Caux, Villequier... le samedi), cours de conversation et de perfectionnement pour débutants et pour les « eternaj komencantoj », jeux, chants, lectures, techniques de rédaction, soirée récréative et d'échanges....

Gite « la Chaumière » 76190 Betteville (Seine Maritime) à proximité de Saint Wandrille, de Caudebec en Caux et du Pont de Brotonne sur la Seine. Attention : possibilité d'hébergement de 18 lits sur place + emplacements pour camping éventuel ou caravanes. Restauration + petit déjeuner au gite. Prix très raisonnables. Tous les renseignements pratiques et bulletins de participation dans les prochains numéros de **Normanda Esperanto Bulteno.**


De la *21a ĝis la 25a de marto 2008* (do dum la Paska periodo) okazos granda kongreso de Esperanto en Francio. Temas pri la unua fojo ekde Bulonjo 2005, ke ĉiuj francaj Eo-asocioj kunvenas kune (Esperanto-France, JEFO, Sat-Amikaro GEE instruistoj, FKEA katolikoj, FET laboristoj, eble ankaŭ fervojistoj).

La ĉeftemo de la renkontiĝo estos « Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo ». Kompreneble okazos turismaj ekskursoj kaj junulara programo. Kotizo estos senpaga por eksterlandanoj. La kongreso okazos en ***MARTIGUES*** apud Marseille kie situas novan flughavenon.

Do ne hezitu plani vojaĝon al Mediteraneo kaj Provencio dum printempo 2008. Informa retpaĝo kaj reta aliĝilo baldaŭ aperos.

Aliajn informojn havos vi en nia regiona bulteno kaj en la diversaj asociaj gazetoj.

**_La Chaumière, Gite de France. Nia kunvenejo en Betteville (76) dum 2008_**



## *En tiu numero :*


| | |
|---|---|
| Agadoj en CAEN | 2 |
| Esperanto Instruado | 2-3 |
| Edukado.net | 3 |
| 26a de Septembro | 4 |
| Agadoj: Le HAVRE,CAEN | 4 |
| 10 viv-resumaj banalaĵoj | 5 |
| FESTO 2007 | 5 |
| Forigo de dimanĉoj | 6 |

# Agadoj en Caen-Hérouville Saint Clair

Maritza Gutiérrez Gonzáez nun estas bone konata en la franca esperantistaro ĉar ŝi jam dufoje prelegturneis dank'al France Esperanto.

Maritza estas ĵurnalistino ĉe Radio Havane en Kubo kaj multe aktivas en la esperantista movado de tiu ribelema insulo. Kiel estrarano de UEA, nia samideanino ofte alflugas Roterdamon por partopreni gravajn kunvenojn en la sidejo de la universala asocio de esperanto. Post tiuj kunvenoj, ŝi estas iom disponebla se iu nacia asocio volas ŝin inviti. En 2006 , ŝi trairis okcidente-orienten la sudan parton de Francio dum tri semajnoj. Pro tio ke ĉiuj tieaj kluboj multe ŝatis la pritraktitajn temojn kaj la interveninton, dua turneo estis organizita printempe 2007.

Tiun fojon Maritza samsukcese vizitis 6 urbojn : Bourges, Chateauroux, Tours, Lunay kaj Angers. Ŝia lasta etapo estis en Hérouville Saint Clair. Ŝi restis dum du tagoj kaj vizitis lokajn vidindaĵojn kun tre disponeblaj klubanoj. La 27an de aprilo, Maritza prelegis pri sia lando antaŭ 45 personoj plej parte ne esperantistaj. Ĉiuj atenteme aŭskultis ŝin kaj faris tre diversajn demandojn. La vespero estis tri-lingva : franca, hispana kaj esperanta. Bela miksaĵo da lingvoj por amika kaj tolerema renkontiĝo.

La kunveno estis kunorganizita de Hérouville kaj de Comité Amérique Latine. Tia kunlaboro interasocia estas tre fuktedona por ambaŭ asocioj kiuj elkovras sin reciproke kaj povas reklami al nova publiko.

Sed ankaŭ homoj konataj nek de Comité Amérique Latine nek de ni venis al tiu vespero : « Kubo : revoj kaj realoj », temo de la vespero, estis sufiĉe alloga. Aperis artikolo en Ouest-France.

La 29an de aprilo, Maritza forflugis al Svedio kie denove okazis eta turneo. Kia energio !

*Yves NICOLAS*

# Esperanto – instruado

*Laŭ ideo, propono kaj iniciato de Lucette Lejeau, de novembro 2006 ĝis aprilo 2007, la asocio Esperanto-Vendeo organizis sestagan ciklon de sabataj staĝoj por perfektigo de personoj jam eklernintaj Esperanton...*

« Unue ekzameninte la Vendean situacion, ni konstatis ke :

- ni ne povis respondi al demandoj por esperantaj kursoj, precipe ĉar la lernontoj loĝis en dise lokitaj vilaĝoj de la departemento ;
- kiam ni proponis kursojn, tro malmultaj homoj, iufoje neniu, konsentis sekvi ilin ĉar interesataj homoj ofte estis okupitaj plurajn vesperojn semajne ;
- por ni, instruontoj, estas tro grandaj devigoj instrui unu aŭ du fojojn semajne ;
- tamen interesaj kapablecoj ekzistas en kelkaj aktivaj membroj de la asocio .

Do, ni decidis provi novan formulon por homoj, kiuj sufiĉe konas esperantajn nociojn, t.e. post unu jaro de kursoj aŭ retkursoj.
Ni proponis ciklon de 6 tagoj unu sabato monate, t.e. 36 horoj da kursoj.

**Materiala organizaĵo :**

Estis tre simpla afero, sufiĉis trovi lernĉambron kaj ĉiu partopreninto alportis sian piknikon. Iom post iom, kafo, kukoj, kaj vino plibonigis la manĝon de ĉiu.

**Pedagogia plano :**

Ni estis 4 instruantoj, kiuj bonvolis entrepreni la aventuron. Kune, ni pripensis la enhavon de la kursoj kaj ni decidis labori duope ĉiufoje. Ĉiu laboris unu fojon kun ĉiu el la tri aliaj.

Tiu formulo prezentas plurajn avantaĝojn :

- ni ne devis liberigi 6 sabatojn, nur 3 ;
- ni eltenis senlace la tutan tagon ĉar ni alterne animis la kunsidojn ;

- kunlabori por prepari kaj animi la kursojn estas tre stimula : tio pligrandigas la kapablecojn de ĉiu ;
- kaj la lernintoj ŝatis lerni kun tiuj duopoj de instruintoj.

**Enhavo de la kursoj :**

Ni definis kelkajn principojn :

- ĉiu tago devus esti aŭtonoma tiel ke iu foresta lernanto povus reveni sen malfacilo ;
- ni elektis heterogenecon. Tio funkciis. En fida kaj ĝoja etoso, ne gravas se ĉiuj ne havas egalan nivelon ;
- kaj ni prizorgis la ekvilibron de la aktivaĵoj. Ĉiusabate ni alterne proponis ekzercon pri malfacilaj nocioj, ludon, kanton, paroladon, legadon, verkadon, aŭskultadon.

Ni uzis diversajn lernilojn :

- slipojn el ***Edukado.net*** por klarigi nociojn (korelativoj, ig/iĝ, de/da, akuzativo...) ;
- diversajn ludojn (memorludo, umo, kartoj...) ;
- teknikojn de verkado : hajko, priskribado de desegnoj por divenigi la aliajn lernantojn, tradukado...
- legadon el «Monatoj tra la mondo», (Internacia lernolibro por progresantoj) ;
- diversajn kantojn.

Ankaŭ ni alternis laborsituaciojn : individua, duopa, grupa laboro.

Ni havis unu dekon da lernintoj, kelkaj el ili lernis Esperanton de pluraj jaroj, poste ili ne plu uzis ĝin kaj profitis de tiu ciklo por rekomenci.

Kiel ni esperis, tiu formulo favoris viglan laboron, kaj ĉiuj lernintoj deziras reveni la venontan jaron, ankaŭ la instruintoj ! »

*Lucette LEJEAU*

Tiu artikolo aperis en la junia numero de ***LA SAGO*** (Sat-Amikara gazeto) n°36a—2007. abono 31 Eŭroj. Sat-Amikaro 132/134 Bld Vincent Auriol 75013 Paris. Tel.: 01.44.24.50.48. TTT-ejo : www.esperanto-sat.info

*Mi opinias ke ĝia enhavo povus esti aplikata al nia Normanda Asocio. Tion ni ekprovos apliki dum niaj venontjaraj regionaj kunvenoj (Legu nian frontpaĝon) la 24-25an de majo kaj 27-28an de septembro 2008,* kaj dum aliaj renkontiĝoj. (**noto de la redakcio**)

Pri la apuda retadreso : ***Edukado.net***, je la 2007/07/09, havas 1323 membrojn el la tuta mondo kaj ĝi ricevis 552.697 vizitojn !

→

***Paĝaro por Esperanto-instruistoj, kursorganizantoj kaj memlernantoj***

- **Katalogo** - reta listo pri lernomaterialoj kaj instruhelpiloj, kun detalaj priskriboj, ligiloj al libroservoj.
- **Lerniloteko** - kolekto de diversaj ekzercoj, instrumaterialoj kaj konsiloj.
- **Monda mozaiko** - interesaj artiloloj, rilataj ekzercoj, ankaŭ mesaĝe riceveblaj.
- **Internaciaj Ekzamenoj** - informoj kaj specimenoj pri la UEA/ILEI ekzamenoj.
- **Legejo** - kolekto de metodikaj kaj pedagogiaj artikoloj.
- **Retligiloj** - listo de utilaj retadresoj.
- **Eduka Servo** - listo de **anoncoj**, **kursokalendaro**, disponeblaj **kursgvidantoj**.
- **Koresponda Servo** - anoncebloj por trovi korespondpartnerojn.
- **Esperanto-lernejoj** - listigo kaj detalaj informoj pri ĉiunivelaj lernejoj kaj institutoj kie Esperanto estas oficiale instruata.
- **Metiejo** - por interŝanĝi spertojn, ideojn kaj kursoprogramojn.
- **Forumo** - por didaktikaj diskutoj.
- **Serĉfunkcioj** - kaj aliaj servoj...

***Por la membroj (senpaga registriĝo) laŭpete mesaĝaj informoj pri la retaj eroj.***

edukado.net

**www.edukado.net**

**Atendas ankaŭ viajn viziton kaj kontribuojn**

**Por lerni Esperanton** vidu : www.lernu.net

**Pliaj informoj pri Esperanto** ĉe : www.esperanto.net

# 26a de Septembro :

*La Konsilio de Eŭropo proklamis la 26an de septembro la ĉiujara Eŭropa Tago de Lingvoj.*

**Kial ni bezonas la Eŭropan Tagon de Lingvoj ?**

Kvankam multaj homoj samopinias pri tio ke ni ĉiuj devus paroli alian fremdan lingvon, en multaj landoj fakte ne pli ol la duono de la loĝantoj scipovas duan lingvon.

Neniam antaŭe estis tiom da okazoj labori aŭ studi en aliaj eŭropaj landoj, sed la manko de lingvaj konoj malhelpas multajn personojn eluzi tiujn okazojn.

Pro la ekonomia tutmondiĝo kaj la internacia strukturo de multaj entreprenegoj pli kaj pli necesas scipovi aliajn lingvojn por efike labori ankaŭ en la propra lando.

Eŭropo posedas veran lingvotrezoron : pli ol 200 eŭropajn lingvojn, sen kalkuli tiujn kiujn parolas personoj devenantaj de aliaj kontinentoj. Tiu grava kapitalo devas esti agnoskata, uzata, gardata.

Lerni lingvon bonegas por ĉiu, de kiu ajn aĝo ; neniam estas tro malfrue por profiti de lingvolernado kaj de la perspektivoj kiujn ĝi malfermas. Lerni la lingvojn de aliaj popoloj helpas nin pli bone kompreni unu la aliajn kaj superi la kulturajn diferencojn.

**Kion celas atingi la Eŭropa Tago de Lingvoj ?**

- Atentigi la ĝeneralan publikon pri la graveco de lingvolernado.
- Konsciigi al ĝi la ekziston kaj valoron de ĉiuj lingvoj parolataj en Eŭropo.
- Popularigi la tutvivan lingvolernadon....

***Ceci est un extrait du premier texte en Espéranto publié sur le site internet du Conseil de l'Europe.***

***Journée Européenne des Langues: www.coe.int/jel***



# Eo gvidilo por viaj ferioj

**Mesaĝo de la Havra Esperantista Grupo :**

**Esperanto kaj turismo :**

www.gvidilo.org

Jam 820 legeblaj slipoj. 86 slipoj por turismaj lokoj en la departemento « Seine Maritime - 76 ». Konsultu la gvidilon por viaj ferioj aŭ por semajnfino. Jam 2876 vizitoj por tiu reta adreso (2007 07 08).

Malkovru la agadojn de tiu aktiva grupo sur la retpaĝo :

www.esperanto-lehavre.org

Havra esperantista grupo, 44 rue Gustave Lennier, 76600 Le Havre. Kontakto : Sylvie CARON : Tel. 02.35.43.64.69.

# Caen Hérouville St Clair

Ne forgesu konsulti la retpaĝon de tiu vigla grupo : « Hérouville Esperanto » ĉe :

www.herouville.esperanto.googlepages.com

Dum 2006, tiu grupo (36 membroj je 2007/06/19) akceptis multajn eksterlandanojn : 1 Tadjikanino, 5 japaninoj el Yokohama + Fukushima, 2 Italoj, 3 Rusoj el Tikhvine, 3 Norvegoj, 2 Ĉinoj, 1 Ruso. Konsultu ankaŭ « la blogon » de la membroj.

# Agrablajn somerferiojn !

Mapo de Esperanto aranĝoj troviĝas ĉe :

www.esperantoland.org

Akuala listo de konataj Eo-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe :

www.eventoj.hu/kalendar

Kaj ne forgesu la staĝejojn Grésillon kaj la Kvinpetalo ! :

www.gresillon.org www.kvinpetalo.org

***21 - 28an de julio 2007 80a SAT-Kongreso en ANTONY* (suda pariza ĉirkaŭurbo)**

www.satesperanto.org

# Dek viv-resumaj banalaĵoj

1. La ŝajne kvalitaj diferencoj de naturo inter ĉiuj aĵoj kaj statoj, fakte fontas el akumulado de grandega nombro da etaj kvantaj diferencoj. La kvantaj diferencoj, eĉ sense neperceptеblaj, estas do signifoplenaj. (A).
2. Oni naskiĝas kun senpaga ricevita kapitalo. Ĝi ne estas sencela donaco kiun oni povas laŭvole malŝpari kaj dediĉi al kio ajn.
3. Tion kompreni tre frue estas decidiga por la sekvo de sia vivo.
4. Homo estas libera ... sed nur je kio koncernas la manieron fari kion taŭgas.
5. Prepari estontecon per la taŭgaj ĉiutagaj etaj ŝanĝoj ne estas necese truda.
6. Oni preparu aŭ ne la estontecon, tempo pasas. Estonteco rapide fariĝas estanteco.
7. Estanteco povas longatempe esti agrabla se oni ĝin preparis. Oni tiom emas vivi je okdek jaroj, kiom je dudek, oni havas tiom da plezurokazoj se oni bone direktis sian vivon... kaj havis iom da bonŝanco.
8. Bonŝanco ekzistas, sed necesas esti tuj kapabla ĝin vidi kaj kapti. (B).
9. La sperto de la maljunulo kuŝas unue en la kompreno de kio antaŭas ; lia utileco kuŝas en liaj provoj komprenigi tion al tiuj por kiuj ankoraŭ tempon havas.
10. Junulo kiu akceptas inspiriĝi per tiu sperto ĝuos grandan avantaĝon.

(A) - Leibnitz bildigis tion tiel (paradokso de la etaj perceptoj) : Kverkofolio distanca je unu kilometro ne estas videbla Ĝia influo je nia retino tamen ne estas nulo, ĉar nulo multiplikita per unu miliono estas nulo. Unu miliono da tiaj folioj kune sur kverko estas perfekte videbla je unu kilometro.

(B) - Ankaŭ tiu kapablo devas **anticipe** prepariĝi : kiam mi estis ege juna, mi trovis laboroferton kun mirinda salajro : oni serĉis personon kiu parolus la japanan ; mi hastegis al la « Berlitz School of Languages », sed kompreneble oni ne atendis min....


*Henri ROUSSEAU*

# FESTO 2007 Muzik-Eo

FESTO, la renkontiĝo ĉiam organizita de JEFO kaj EURROKA okazos en la urbeto **Montoire-sur-le-Loir** (ĝi troviĝas 150 kilometrojn sudokcidente de Parizo) de la **20a ĝis la 27a de Aŭgusto 2007.**

www.festo.esperanto-jeunes.org

www.myspace.com/festo2007




# Dua listo de kotizintoj por 2007

(Ĝis la 2007 07 09). Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Ge-Soj :
*BATAILLE*, BONNET, *COLBERT*, DUBUC, *DUFOSSE*, LAMY, *LANGEOIS*, LARDEUR, *LEVY*, MAGEREL, *MOYON*, RAUCH, *ROUSSEAU*, ROUSSEAU-PELLICO, *SCHERTZER*, TANGUY, *TOUILEB*.

Faru vian ĉekon profite de ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN
Abon-kotizo por 2007 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine
Tel. 02.35.34.28.78. - LEMARCHANPI@wanadoo.fr



*Poŝtmarko eldonita en Kroatio.1997. 1a kongreso de Kroataj Esperantistoj.*

# Nia debato : Ĉu vi deziras forigon de Dimanĉoj ?

*« Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj »*

## *Mia opinio pri dimanĉa laboro :*

Mi trovas tre interesa la temon pri la dimanĉa laboro. Eble mi estos « advokato de la diablo » (*) :

Mi neniam ŝatis la dimanĉojn, precipe en la urboj. La urbo aspektas mortinta. Homoj sencele kaj senokupe promenas : ŝajnas al mi ke ili enuiĝas.

Se la dimanĉoj estus kiel la aliaj tagoj, la semajno daŭrus seninterrompe. Laboristoj povus havi siajn ripoztagojn kiam ili dezirus konsentite kun aliaj kolegoj kaj ĉefoj. Tiuj kiuj ne volus labori dimanĉe ne laborus. Sed infanoj neniam laboru dimanĉe ĉar situacio fariĝus tro komplika. Plejbone estu ke gelaboristoj elektu siajn ripoztagojn rilate al situacio de la familio : tiel gepatroj ferius kun siaj infanoj.

Jam nun, multaj homoj laboras dum dimanĉo kaj ni trovas tion normala.

Plejmalfacila kaj eĉ abomena estas laboro kun ŝanĝo de semajna horaro kiu devigas komenci matene aŭ posttagmeze aŭ nokte.

*Monique DUBUC*

(*) « Avokato de la diablo » : Tiu kiu defendas la kontraŭan kazon de tiu prezentita antaŭ li.

Ni deziras pli kaj pli da libera tempo. Ekzemple « la 35aj horoj » da laboro po semajne. Sed la problemo komenciĝis dum la lasta mondmilito kiam la Germanoj devigis la fermon de la komercejoj lunde en Francio okupita. Poste tio daŭris sufice longe, sed iom post iom, pro imago de kroma profito, multaj komercistoj, precipe la estroj de la « superbazaroj » komencis malfermi lunde. Sed tio ne sufiĉas al ili; nun ili inside proponas dimanĉan malfermon ! Ĉu por la bono de la konsumantoj ? Certe ne, ilia nura motoro estas la profito kiun ili vestas por ĉies bono.

La vera intenco estas malaperigo de la konkurenco de aliaj komercistoj. Kiel prave komentis Petro Quillaud, la ĝenerala elspeza sumo de la konsumantoj ne estas pligrandigebla; nur la sum-suĉantoj ....



povas ŝanĝiĝi ! Baldaŭ ili petos malfermon 24 horoj po tage, kial ne ?

La malgrandaj butikoj ankoraŭ kaptas kvanton da klientoj, sed ĉu ili povas malfermi unu plian tagon ? Certe ne ! Kaj kion ambicias la kapitalistaj interesoj de la supermagazenoj ? = Estas malaperigi tiun konkurencon.

Mi aŭdis ĉe la nacia televido aŭ radio (mi ne plu scias) Sinjoron Michel Edouard Leclerc (Li tiel fieras ke ili enmetis la pronomon de la kreinto de tiu komerca firmao en ĝia ŝildo) fanfaroni ke li kreas laborlokojn ! Li forgesis diri kiom da postenoj li malaperigas en la ordinaraj magazenoj ! Kaj ĉu la bona solvo en bone organizata socio ne estas doni laboron al la plimulto ?

Mi ne estas kontraŭ la moderneco, sed ekzemple kiam mi ricevas de la impoŝta administracio varbilon pri aŭtomatigo de miaj pagoj, mi la folion resendas skribante ke kiam estos malpli da senlaboruloj, mi ĝoje akceptos la proponon. Almenaŭ mia ĉeko devas esti prizorgita de la administracio, kaj ankaŭ de la banko per iu persono kiu laboras kaj estas pagata por tiu laboro.

*Alain CHALM*

**62a Regiona Staĝo de Esperanto - SAÂLES** - 45 kilometroj el Strasbourgo en alzacaj Vogezoj. **19 - 21 oktobro 2007.** Centjariĝo de Esperanto-Strasbourg kaj franc-germana amika renkontiĝo. Bunta programo por ĉies intereso : pliaj informoj :

www.esperanto-strasbourg.net



*Poŝtmarko eldonita en Israelo. 2007. 120-a datreveno de Esperanto.*